Jen do — mi spiras,
laboras,
mi vivas
kaj verkas poemojn
(laŭ mia kompreno),
la vivon severe
rigardas subbrove
kaj luktas surtere
kun ĝi mi laŭpove.

La vivon mi spitas,
kun ĝi mi militas,
sed vi ne komprenu,
ke mi ĝin malamas.
Ho, male, ho, male!
Se morto eĉ venus,
la vivon kun ŝtale
krudfortaj manegoj
ja tamen mi amus!
Ja tamen mi amus!

Imagu: min oni pendigas
kaj oni demandas:
„Ĉu horon deziras vi resti vivanta?"